Fakula kunsido pri la
Kodigo de la Homa Rajto je Paco
11 marto 2010, Ĝenevo, Palaco de Nacioj
Ĉambro XXIII, 15h10-17h00

Saluton, Muchas gracias.

Mi nomiĝas Stefano Keller, reprezentas Universalan Esperanto-Asocion, la tutmondan asocion kaj movadon de la uzantoj de Esperanto, la internacia, interetna aŭ interkultura lingvo. Universala Esperanto-Asocio estas hodiaŭ la voĉo de etnaj, lingvaj minoritatoj.

Parolante pri paco, ni devas pensi ankaŭ pri justeco, pri interago, komunikado inter diversaj ethnaj grupoj, diversaj kulturoj, popoloj kun diversaj gepatraj lingvoj. Kaj estas tre grave kompreni unu la alian por atingi tiun tiom deziratan pacon. Ni devus havi la eblon, ni ĉiuj el la tuta mondo, nin esprimi en lingvo facila por ni, en kiu ni reale povas transdoni nian mesaĝon sen miskomprenoj.

Lingvaj rajtoj estas esencaj al ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties anaro. Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas minoritatajn lingvojn jam de pli ol 100 jaroj, en kunteksto de tutmonda homara solidareco.

Naciaj, ŝtataj lingvoj ne estas taŭgaj por komunikado en interetna societo, tial, ni, esperantoparolantoj, aŭ esperantistoj, utiligas Esperanton en internaciaj laborgrupoj kaj sugestas la uzon de la internacia lingvo en ĉiu interetna rilato.

Por konkludi, permesu al mi mencii, ke Universala Esperanto-Asocio partoprenas en la pli grandaj programoj de UNESCO.

Ni efektivigas programojn ‘Edukado al kulturo de paco’ en Afganistano, Balkanaj landoj, Irano, Maroko, Burundo, Indonezio, ktp.

La granda espero de esperantistoj estas, ke la mondo iĝos pli paca loko, kaj ni kredas en tio, ke efektiva komunikado ludas tre signifan rolon en la realigo de tio.

Gracias, Thank you, Dankon por peti nin esti unu el la kunsubskribantoj de la Rekomendoj pri la Kodigo de la Homa Rajto je Paco.